# MEM

# B.G.D

Sed nur kiam Vivo min pli krude testis,
Poste mi komprenis: Pordo mi mem estis!
..........................................
Kaj tiel, finfine, pro amo al Kristo,
Judaso atingis al "Kamp' de l'Potisto".
(Di-fina Komedio.)

La Juna Penso

F 47340 Laroque Timbaut
Feb.1973 - N° 88B

Gérant & imprimeur:Baudé,F 47340 Laroque Timbaut
Commission paritaire de presse.........n° 39 863

# MEM

o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o

## A V E R T O

For la diletantoj! detenu vin eĉ de eklego. Sen zorga legado,grandega peno kaj profunda meditado ne eblas ĉi tie ion kompreni kaj profiti.Mi ne celas incensi sed tranĉi. Mi verkas por tiuj, kiuj jam scias, do, kiel povus vi kompreni ?

Ne forlasu vian senkonscian Edenon, kaj ne stultu kiel Dio, kiu senĉese en ĉielo pentas pri sia fuŝa kaj propra kreado, sen eblo akuzi pro tio iun alian ol sin mem.

Ne fuŝu mem vian vivoĝojon: lasu tion al la vere kompetentaj sinceruloj, kiuj poste ne havos sufiĉe da larmoj por penti, kiel Dio, pri la propra kulpo.

Mi sufiĉe tedis min verkante, por kompreni kiel tedega (kaj senutila) estus por vi la legado.

Precipe ne opiniu,pro justeca sento,ke,ĉar mi penis por verki tion, vi estas morale devigataj ĝin legi: estus grava eraro! kaj mi povus nur ĝoji egi, se mi ekscius, ke iu el vi estis sufiĉe komprenema por tuj ĵeti tiun verkaĉon nelegite en la rubujon, aŭ sufiĉe malicema por donaci ĝin venĝocele al malamiko.

Se vi tion ne faras,ne akuzu min poste pro viaj propraj pretendemo kaj nekapablo asimili temojn , tute ne kongruajn kun via nuna spiritstato,kaj pro la aliaj konsekvencaĵoj tute nete antaŭvideblaj kaj neeviteblaj pri kiuj vi mem respondecos. Do , flegu zorge vian normalulan mensan sanostaton, ne perturbu ĝin malprudente; lasu tiel stulte agi tiujn,kiuj,tiuflanke, ne plu riskas perdi ion ajn, transpasinte jam de longe la muron de frenezeco.

Tiun fojon mi sufiĉe avertis vin, do gardu vin!

B.G.D

o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o

Benjameno G. Delalot, la aŭtoro de ĉi tiu kajero. kaj de la sep antaŭe jam aperintaj, t.e. "Funde de l'Puto", "Di-fina Komedio", "La Tri Romioj", "Jen la Homo!", "Simpla Lekanteto", "Kvarfolia Trifolio" kaj "Sur la Monto", pretas memstare, malkaŝe kaj publike respondi, laŭ siaj propraj kapabloj kaj pere de LJP, al ĉiuj seriozaj klarig demandoj pri la temoj pritraktitaj en tiuj kajeroj, kiuj ne timus publike sin manifesti.

# M E M

o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o

Ĉu organon ne mem kreas la funkcio,
Kaj ĉu homon ne mem kreis iam Dio ?
Filozofoj kaj Biblio jen atestas,
Sed, je nomo de konscio mi protestas.
Kiel povis ja senkorpa "nekreito"
El si tiri materion kun spirito,
Por, el tio, tiam formi ĉiujn estojn,
Ankaŭ homojn, eluzante ĉies restojn ?
Ĉu ja eblas, eĉ kun granda bonvolemo,
Ne rideti pri ĉi tiu stranga skemo ?
Ni konfesu, ke nur temas pri simboloj,
Oferitaj al adoro de l'popoloj,
Por plej lerte mastri ilin en konsento,
Per uzado de mistika homa sento,
Ĉiam preta, pro konscio sen maturo,
Antaŭ multaj la problemoj de l'Naturo,
Kredi je agado de superaj fortoj,
Mem zorgantaj el ĉielo pri homsortoj,
Per la helpo de bonkoraj la paŝtistoj,
Kiujn homoj devas fidi sen rezistoj.
Sed, je la jarcento jam dudekunua,
Ni ne plu pretendu, kun ignoro plua,
Ke ĉi tiuj prarakontoj nur fabelaj
De realo estas bildoj ja fidelaj.
Ili fontis el la homa imagemo,
Por utili, plej konvena kaŝsistemo,
Al transporto, tra jarmiloj mallumecaj,
Malgraŭ dogmoj kaj tabuoj ĉiuspecaj,
De la konoj elkovritaj dum pratempo,
Kiu estis de homaro la printempo.
Tiam homo, ek al tera aventuro,
Plej intime kontaktiĝis kun Naturo,
Kaj reagis al atakoj de l'medio,
Kiel plene novŝargita baterio,
Kies vivo daŭris multe pli ol nia
Pro aero sen miksaĵo polucia.
Tiam spertoj de multegaj spitaj tagoj
Enpikiĝis en la cerbojn, kiel sagoj.

Kies vundoj en la freŝa virga histo
Iĝis stampoj memorigaj pri l'ekzisto.
Kaj ĉe tempo de l'modernaj scienckonoj,
De vojaĝoj kosmaj kaj de ciklotronoj;
Kiam antaŭ ni sin sternas senvuala
La ĉielo, kiel io plej banala:
Materia-energia sinergio
– Demonstrita iam de analogio –
Kiu sin mem, per senĉesa evoluo,
Kreas kaj detruas, kvazaŭ ondofluo,
Kaj plunaskas la tutkosman radiadon,
Lumofonto floriganta stelparadon,
Plej ridinda nun aspektas la rimedo;
Nur per trudo daŭre eblas la procedo.
Ĉiu scias nun, ke nia universo
Estas io sen averso nek reverso,
Senlimaĵo en konstanta ekspansio
Laŭ la lasta sciencista konvencio.
Kaj en tio, dum sennombraj la epokoj,
Estis ja neniam por la dioj lokoj.
Kion do pri ili devas ni kompreni ?
Pli racie estas mem pri tio peni,
Sen atendi, ke la konformistaj fortoj,
Paralelaj fizorgantoj pri homsortoj,
Mem bonvolu nin klarigi pri l'afero,
Kiu estas ja por ili sen mistero,
Sed sen eblo mem eliri de l'fatraso,
Ĝis alveno de memvola nov-Judaso,
Stulte preta sin oferi por homaro,
Kiu poste lin malŝatos sen avaro.
Ĉar racio ne kondukas la amason,
Kiu mem al Krist' preferas Barabason.
Per fiagoj ĝi celados misinflui
Ĉiam tiun, kiu provos ĝin instrui.
Sed, ĉar, nereŝanigebla idioto,
Mi kapablas plukompati pri la loto
Plej amara de ĉi tiu sociaĉo,
Nun valora por mi malpli ja ol kraĉo,()

()Temas pri socio administracia ento,ne pri la apartuloj ĝin konsistigantaj; mi batalas kontraŭ konceptojn,ne kontraŭ individuojn.

Kiu vole min reduktis al sklavstato,
Min kondamnis sen averto, sen debato
Al plej drasta izoleco kaj ...sen deco,
Nome de libero, egaleco, kaj frateco;
Min maldungis plej abrupte sen motivo,
Spite leĝon kaj sen kromalternativo:
Ĉu aniĝi al la "granda familio" ,
Ĉu rezigni pri la tera "idilio" ?
Dum samtempe, por sufiĉe min insidi,
Oni trudis miajn filojn min perfidi;
Ke per ili mi troviĝu en mizero,
Kaj ke mi mortigu min pro malespero.
Ĉar mi fineskapis, sed kun mir' insista
Pro traktado tia "vere humanista" ;
Ĉar mi nun por perdi havas plu nenion,
Kaj ĉar mi pro Ver' ne rajtas koluzion;
Ĉar mi nebaptito, nek ekleziano,
Nek sektano, nek pagano...nur profano
Plu spitanta "eksterdome" , kun obstino,
Al apokalipsa la prostituino,
Kiu estas la tutmonda inicado,
Plej potenca pro frateca maskerado;
Do enhavas la ecaron postulitan,
Por plenumi Judasrolon implicitan,
Sen perfidi la instruon esoteran,
Kiu celas subagadon malsinceran,
Plej profite al apartaj societoj,
Per mastrado de proletoj far proletoj;
Kiu faras de l'fasad' oficiala
Nur objekton de mokado triviala;
Mi do povas nun malfermi novan pordon;
Propagandi ĉie Veron kaj konkordon,
Kaj neniu "rajtas" min opozicii,
Ĉar nur eblas antaŭ Ver' apelacii.
Mi ne vokas al mistika klasbatalo,
Nek al novrevolucio pro fatalo;
Mi nur montras tion, kio estas Vero,
Mem lernebla en Naturo sen mistero,
Sen okulta misagado kaj sen kulto,
Sen supera kapableco aŭ fakulto.
Nur necesas kompreneme mem bonvoli,
Kaj persiste sur la Vojo ne frivoli.

Sed mi nun ĉesigas tiun prologadon,
Transrigardas de simboloj la fasadon.

Ĉu komence estis io aŭ nenio ?
Ilin same reprezentas nulo-Dio,
Kiu estas la "ovola" viv-vehiklo,
Nepra tuto ĉe komenco de vivciklo,
Tempospaca koncentriĝo Elohima
Memsterila sen la semo legitima.
Sed mem tiu ĉi ovolo pri homparo
Supozigas, kun amplekso sen komparo,
Kaj nin konsciigas tuj pri la rilato
Mikrokosma-makrokosma sen traktato,
Ankaŭ krome pri maleblo ĝin percepti,
Kvankam ĝin logiko trudas nin koncepti:
Io el nenio, ovo el kokino.
Nul' el nulo, sen komenco kaj sen fino,
Ondojfluo, spacoskaloj-kavalkado,
Sfermultiĝo de l'eterna radiado
Emaninta el fisio plej normala
De l'ovol' en uter' universoskala,
Ankaŭ el rapida multobliĝo ĉela
Analoge al "eksploda fungo" hela,
Kiu ŝvelas ĝis la lim' de ekspansio,
Kaj disfalas al la polva dimensio.
Tiel same elaspektas eksplodive
Ĉies esta malvolviĝo efektive.
El la ovo detruita fontas formo,
Ampleksiĝanta laŭ specia normo,
Kaj aparte propraj tempo-spacaj skaloj,
Kiuj estas de substanco la modaloj.
Kaj pri tiu elaspekto de l'Naturo,
Kun heterogrando, -denso kaj -konturo,
Ni parolas konvencie per la nomoj:
Kosmo, suno, tero, plantoj, bestoj, homoj,
Vivo kaj ekzisto, providenco, sorto...
Dum jen estas ili formoj nur de morto,
De disociado de la materio
Far l'eterna radiada energio,
Fuĝprovanto en konstanta eskapado,
Kaj "serpento" de l'Geneza serenado,
Kristo-Lucifero, Febo kaj Apolo,

Fajro tera kaj ĉiela, en bi-rolo,
Spado kaj spatelo, vundo kaj balzamo,
Militinstiganto kaj ĉiela amo,
Vero kaj eraro, lumo kaj mallumo,
Suno mem sin oferanta al krucumo,
Pordo de l'infero kaj de l'paradizo,
Dio de l'justuloj kaj ...ŝtelorganizo,
Fitrompanto kaj savanto de l'homaro
En figuro de Mesio aŭ Cezaro.
Kaj ĉi tio ekokazas konsekvence
En la "ovo" per kuniĝo, ĉekomence,
De l'triobla radiado elekstera:
Suna, luna kaj planeda kun la tera,
Mem fontanta el la fajro ovokerna,
Kaj efikas per putrigo ovinterna,
"Ĝemeligo" de la ĉelaj elementoj,
Kaj apero de novspecaj sedimentoj,
Organaro spegulanta kun fidelo,
La gepatrojn, post rompado de l'ovŝelo.
Tiel formas sin kokido tre banale,
Tiel ankaŭ ĉiuj estoj ĉiuskale.
Sed pri tio ne necesas pluparoli;
Por kompreni nur sufiĉas mem bonvoli.
Tiel same okazadas en la kosmo,
Kiel jen okazas ankaŭ en la homo.
Nur al ni malhelpas la skaldiferenco,
Por senpere sensi pri l'Di-providenco.
Sama leĝo en Naturo ĉion regas,
Kaj por ni analogio ĝin maltegas.
Tiasence firmatestas la Biblio,
Ke la homo estas bildo mem de Dio.
Ĉu bezonas citi l'grekajn filozofojn,
Kaj la ĉiestempajn ĉiujn teozofojn?
Ĉu profitis ili pli ol ni da konoj ?
Ne! sed ĉiuj samkonkludis per rezonoj,
Kaj konsilis same al disĉiploj siaj:
"Konu cin mem: scios ci pri ecoj diaj."
Jen sufiĉas por konkludi pri la temo,
Sed ekzemplo helpos al la komprenemo.
Se ĥirurgo el transkosma tiu mondo
Volus sekci nian kosmon ĝis sunrondo,
Je lumrapidec' la pinto de l'skapelo

Post kvin jarmiljardoj trafus nur al celo.
Kiel dioj tie rolas? Nur ridinde.
Ne plu decas nun pri ili kredi blinde.
Tamen ili konsistigis prainstruon,
Kiu spitis de libero la detruon,
Kaj necesas nun retrovi en simboloj
La signifon deponitan de praskoloj,
Por, per helpo de fabelaj kompendioj,
Pli racie konsciiĝi pri la dioj,
Kaj sin liberigi el mistika sento,
Por atingi al la Vero en konsento.
Pro skaldiferenco vanas homespero
Pri kontaktoj kun transkosmoskala sfero.
Eble iam mem solviĝos la problemo,
Sed por homo nun pli gravas sunsistemo,
Kun amplekso kosmrilate atomskala,
Sed homskale agadkampo pli normala.
Ĝi ĉielan "homon" veran konsistigas,
Kaj konscio ĝin ekkoni nin instigas.
Ĉar ĝi estas mem la korpo, kies vivo
Kondiĉigas rekte nian sen fiktivo.
De l'planedoj, per pulsado plej konstanta,
Suna lumo estas sango viviganta;
Radiado efikanta per osmozo
Kaj per tera atmosfera grandiozo.
Estas ĝi la "dio", kies estas homo
Mem la bildo laŭ l'antikva aksiomo.
Sed necesas nete scii per apreco
Pri analogeco kaj pri simileco.
Simileco nepra identeco estas,
Dum analogeco malsameco restas.
Analogas ovo, suno, reĝo kaj leono,
Tamen ne similas...sen klarigbezono.
Same viro al la Tempo analogas,
Dum la Spaco virinformon sin arogas.
Ambaŭ fontis el "Pandora la skatolo",
La gameta paro, tuto kaj...ovolo.
Sed pri tio ne parolu ni sen fino:
Estas ja nek fina, nek komenca "sino":
Ili staras ekster homa pov' kompreni,
Kaj pro tio ne necesas sombre spleni.
Sed demando restas: kio estas Dio ?

Ĉu kreita tiu "Ĉio-kaj-nenio" ,
Kaj konata "Demiurgo" de l'Kabalo,
Antaŭ ni sin nun montranta sen vualo?
Ĉu do la "Logoso": Kristo kaj...placento?
Ĉu la du "kolonoj" de la "Templa Ento",
Patro kaj Patrino, reĝa celo de l'tri Magoj?
Ĉu "l'Ketera Malnovulo-de-la-Tagoj",
"Nekoncepteblulo", sen indiko plua,
Kiu rekondukas al l'ovol' unua?
Nur senlima, tutpotenca kaj eterna
Estas la Vivoprincipo ja koncerna:
La unika vera Di' sen ambiguo;
La Procezo de ĉiama evoluo,
De la diseriĝa multobliĝo ĉela
Ekfontinta el rompiĝo ovoŝela;
Radiado de sennombraj ondosferoj,
Kun apartaj materiaj karakteroj,
Ennaskantaj ĉies formojn de la Vivo
Per flusanta-malflusanta tajdaktivo.
Kaj en tiu ondosferoj-oceano,
Nur ovolo - mi specifas sen rikano -
De la kosma ĝis plej granda ondlongeco,
Jen la sfero, kie eblas l'homa speco:
Ĝi ampleksas ok dekonojn de mikrono,
Kiu estas milimetra mem milono.
Eta zono, kie montras sin la lumo
Kun intensa energio-maksimumo.
Tri kvaronoj de la suna energio
Tie koncentriĝas: vivprivilegio,
Kiun mem profitas, de stadio "tera",
Ĉiu kosmatom' pro pero atmosfera,
Kaj la homa korpo pro intesta flaŭro,
Sangofera loko de la Mitra-taŭro;
Renovigo per la suna radiado,
Kaj simbolo de la sanga cirkulado.
Per sistema tia konosimboligo,
Kaj al religioj kruda kredinstigo,
Iĝis ebla la mastrado de l'popoloj
Timigitaj de la dioj kaj idoloj,
Senigitaj de instruo, eĉ teknika,
Rezervita al "elito" hermetika,
Brutigitaj de laboro kaj nescio,

Sen koneblo kroma ol la tradicio.
Tra la lasta jarcentmilo de l'homaro
La sistemo brutigadis sen avaro.
Nun, kaj malgraŭ la eltrovoj sciencistaj,
Plu triumfas la praktikoj antaŭkristaj.
Kaj, post Kristo, ĉe dudeka la jarcento,
Ĉu plu evoluis la homeca sento ?
De la homoj plimultiĝis la viktimoj;
De pli da danĝeroj ili la viktimoj,
Sen eĉ defendeblo, iĝas ĉiutage
Kaj pri evoluo nur konscias svage.
En socio ili grumblas kaj robotas,
Sin alfrontas kaj sin tute maldorlotas.
Ili, ne pli ol prahomo en kohorto,
Ne superis la koncepton pri perforto,
Kaj ne povas kune vivi sen justico,
Sen armeo kaj sen taŭga klabpolico.
Kaj por karieri, laŭ la praekzemplo,
Ili devas iĝi sklavoj de la "Templo".
Enĉenitoj sen privata vera rajto,
Sen memvolo kaj sen personeca trajto;
Estraj aŭ obskuraj hommarionetoj
Ĉiam pretaj al moralaj piruetoj,
Al perfida fanatika fiagado,
Por plu resti en "frateca Eldorado".
Tiu, kiu aparteni ne deziris
Al la "Templo" kaj memvole ĝin ne iris,
Juĝu ilin. Mi tro celis al frataro,
Al komuna sento kaj al solidaro,
Por riproĉi tiujn, kiuj ne progresis
Sur la Vojo, kie fine mi sukcesis;
Kiam sole kaj sen brila aŭreolo,
Mi atingas al plej fia Judas-rolo,
Same perfidita de konscio mia,
Kiel ili de sentiment' iluzia.
Ni ne apartenas al la sama Mondo:
Ilin naskis Tero, min ĉiela rondo.
Ili krude min ignoris, maledukis,
Kaj nevole mem al celo min kondukis:
Ne konvenas ja koncepto nur terskala
Al spirito el deven' universala;

Post kuniĝo fekundiga nur momenta
Ĝi obeas al ordono disidenta,
Kaj revenas al ĉiela deirpunkto
Por novtaska sinofero post nov-unkto.
Tiel mem sin nodas kaj malnodas vivo,
Teorie kaj praktike, sen fiktivo.
Per trioblaj samdevenaj tri influoj
Materio formas sin de tri unuoj
En interno de senlima la patrino,
Spaco kaj retorto, "Temponmodla sino,
Kaj utero en konstanta ekspansio,
Paralele kun la "tempa dimensio".
Konsekvence, same kiel Temp' eternas,
Tiel same, proporcie spac' sin sternas;
Dum en ili la "Principo" evoluas,
Kaj senfine ilin kreas kaj detruas.
De kosmonda skal' al skalo makrokosma
Cikloj-implicado iĝas histo kosma.
Same kiel ĉiu spaca ekspansio
Konformiĝas al kuntempa dimensio,
Tiel konformiĝas formoj sur la Tero:
Al la estoj kaj objektoj, la aero;
Al la kontinentoj, l'oceanamplekso;
Al peniso vira, la virina sekso;
Al individuo, l'ento kolektiva,
Kaj al la ostaro, korpo efektiva.
Tempo de la Spaco estas la potisto;
Ano, la kondiĉo de sociekzisto.
La interna formo kreas la eksteran,
Kiu konsistigas nur "medion peran".
Ĉu konkludi, pro pripenso sen profundo,
Ke valoras pli la semo ol la grundo?
Elementoj samutilaj al la Vivo
Ambaŭ estas, ekster ĉia ekskluzivo.
Kvankam malaj, laŭ aspekto kaj talentoj,
Ili estas du naturaj komplementoj,
Devenintaj el... l'ovolo dekomenca,
Detruita pro multiĝo konsekvenca.
Ĉar se Amo estas pariĝ-instiganto,
Per amoro ĝi fariĝas fitrompanto;
El ĉielo sin ĵetinta amanĝelo,
Sur la Tero ĝi aktivas per kruelo.

Estas ĝi la praserpento, la "Drakulo",
La vampiro, sangsuĉanto sen skrupulo,
Lucifero vekiĝanta kun la nokto
Kaj aganta per dogmeca ŝajna dokto.
Pro memmultobliĝo ĝis al tuthomaro,
Ek el la Edeno mortas la praparo.
La ĝarden' edena estas la simbolo
De homara dekomenca la...ovolo,
Kun Adama kern' kaj Eva-protoplasmo,
El Adamo eksudinta ektoplasmo,
Same kiel fontas en rondo aktiva,
El individuoj tuto kolektiva.
La serpento estas la spermatozoo,
Homkonscio fariĝinta protozoo,
Homokorpa fekundiga radiado,
Mikroondo el tutkosma ondparado,
Lumportanto, "promotoro de l'infero"; ()
Prometea incendio de la "Tero";
Sindetruo de Fenikso mem per fajro,
Plu celanta renaskiĝon por salajro.
De enova ĝis elova dimensio,
Lumo celas al senlima ekspansio.
Eloviĝo konsistigas vivostaton,
Kaj la morto enoviĝan rezultaton.
Kiel ondo naskas ondon pli ampleksan,
Tiel korpo naskas korpon pli kompleksan,
Kiu, laù la kapablecoj akiritaj,
Pro alceloj materiaj aù spiritaj,
Ĉu stagnadas en la sama ondosfero,
Ĉu regresas aù progresas tra l'etero.
La animo analogas elektronon;
Ĝi ellasas aù akiras mem fotonon,
Kio estas: pli da lumo aù da scio,
Kaj atingas al kapablo per konscio.
Jen la fonto vera de metempsikozo,
De l'Principo, kosma lumapoteozo;
Senekskluziveca komunio paca
Ĉies estoj en la "Gralo" kosmospaca.
Partopreno al "Ŝafida" nuptofesto:
Materia multobliĝa manifesto

()promotoro = instiganto kaj realiganto.

De l'ovolo fariĝanta kolektivo
Pro l'ĉiela fajro ĉiam en aktivo.
Tiel, de l'maljuniĝinta Judaismo,
El Jesuo mem sin formis Kristanismo,
Per simbola sakrament' eŭkaristia,
Kiu, per imita vera kult' magia,
Montras, ke de longe estas, sen trumpeto,
La ĉelmultobliĝo tute sen sekreto;
Same kiel samuraja harakiro
Mem rivelas pri malnova konakiro,
Pri la kvara tago de l'kreado Dia,
Kaj pri falsa instruado parodia.
Ankaŭ pri l'ekzisto de "internacio",
Kiu mem, per antropomorfisma scio,
Zorgas pri konstanta popolbrutigado
Kaj mastrado per mistika maskerado.
Tiel, homoj baras al la Dia Volo,
Kaj fariĝas tiam Vivo nur simbolo.
Harmonion anstataŭas diktaturo;
Vivplezuron, la doloro kaj sufero,
Pro plenumo de koncepto malhumila:
Finatingo al ficelo malutila.
Ĉar, de Tero homo estas la loĝanto,
La zorganto reĝa kaj Di-intendanto.
El Tersfero ĝi, per morto, liberiĝas,
Kaj, tra l'korpo sunsistema, plupuriĝas
Per vehiklo de l'sunlumo, sangofluo,
Interspaca cirkulada kontinuo.
Nur spiritoj tie rajtas travojaĝi;
Homfuzeoj nur kapablas ĝin kontaĝi,
Kaj la Tero, "sunsistema intestaro",
Iĝi kanceriga fonto far l'homaro.
Sen analogiaj mensaj "spektroskopoj",
Sciencistoj, malutilas mikroskopoj!
Pli ol ili simpla aŭtocirkulado
Nin instruas pri kancero, sen ŝarado.
Ĝi devenas de abnorma potenciĝo
De l'kapitalisma "koro" ĝis vertiĝo,
Pro konstanta stimulado per la "drogoj"
De doktrinoj el diversaj "sinagogoj",
Kiuj celas nur la propran intereson,
Propran ekspansion, propran kromprogreson,

Sin enfermas en apartan regularon,
Kreas novajn "eklezion kaj altaron"...
Kompreneble, ĉiu ĉelo same agas,
Kaj prospere la afero sin propagas,
Malprofite al la tuto organara,
Kiu kaĥeksias pro organo akapara.
La sunlumo estas sango materia,
Kaj la Vivo, multobliĝo anarkia.
Internaĵoj-elmontrado de realaj
Enovolaj la eblecoj virtualaj,
Korpo mem al kancero analogas,
Kiu lokon en Naturo sin arogas,
Kaj pluampleksiĝas laŭ aparta normo,
Ĝis atingo de kompleta ĝia formo.
Stimulilo mem efikas nur pro tio,
Ke rapidas pli la propra ekspansio;
Sekve iĝas viv' aparta en la vivo,
Kaj kancero en kancero, kun aktivo,
Kiu fine neniigas la reziston
De la korpo kaj elmetas propran histon.
Jen grandtrajte de kancero la procezo,
Laŭ analogio, kaj sen hipotezo.
Nur reiro al normalaj vivreguloj
Ĝin malhelpas, sen aliaj krompostuloj.
Sed, en nia mondo tiom malinstiga,
Vivo nur normala iĝas rev' troiga!
Ridu sciencistoj! ridu pro l'publiko!
Ridu laŭte, ĉar tro simplas la espliko!
Ridu ĥore "humanista citadelo" !
Ridu stare sur la alta kapitelo
De la pedanteco! por mi ne gravas:
La praktiko al mi pruvis, ke mi pravas.
Ĝi min plue pruvis, en soci' profita,
Kie eĉ karito estas "leĝe impostita",
Ke tro rentabilitata estas sano,
Por ke oni zorgu dirojn de profano;
Kaj ankoraŭ, ke ne helpas la scienco,
Por sin savi en ĝangal' sen konscienco.
Same kiel homo de prahistorio,
Ĉiu sin mem savu per la propra scio.
Mi akiris mian per tro da doloroj,
[illegible] nuntempe pluparoli sen rankoroj,

Pri scienco perfidinta sian rolon,
Kaj mastranta "grandsorĉiste" la popolon,
Kiu blinde kultas al la di' freneza.
Sed sufiĉas pri ĉi temo parenteza,
Kvankam ĝi kun mia plene mem kongruas,
Ĉar ĝi "veran vivprocezon" ne instruas,
Tial necesigas Judas-rolon plian,
Por,sur Tero, montri la stampadon Dian:
Enmateriiĝo de kosmradiado,
Nokta lumofonto kaj stelparado,
Mem fontinta el detruo materia,
De l'animo ekspansio eŭforia.

........................................ ()

Sed konvenas nun ripozi momenteton,
Antaŭ ol alfronti Dian la skeleton,
Kaj pripensi ĉu valoras nova peno,
Por forfuĝi el mensstata nun Edeno;
Por forlasi la "lulilon" de nescio
Kaj transpasi en plenlumon de konscio.
Se mi pretas al la arbo min pendigi,
Kaj en "Kampo de l'potisto" vin prodigi,
Per kreviĝo kaj naŭziga elmontrado
De interno mia ekster korpfasado,
Novinstruon, nur skandalo de l'skandaloj,
Sin montranta ĉe la sojlo ĉies "faloj",
Devas vi decidi mem ĉu Eva pravis,
Kiam pro konavidemo ŝi malhavis,
Por idaro ŝia kaj pro Di-malbeno,
La edenan feliĉecon de senpeno.
Vi nun staras en la kerno de l'problemo:
Ĉu vi frontos plu al Dia anatemo?
Ĉu l'homaro restos en Terparadizo?
Ĉu ĝi celos al novskala penprovizo?
Ĉu l'ovolo devas resti senfekunda,
Ĉu fariĝi nova korpo spertabunda?
La "serpento" kuŝas ĉe l'anima sojlo:
Kristo-Lucifero, humilec' kaj orgojlo,
Patro kaj Patrino, Dio kaj ...Judaso,

() Ĉesigita de la 21a/5/72 ĝis la 8a/6/72 pro finesploro de l'pokalo.

Kiu pentas pri l'kreada fuŝfatraso,
Kaj jam agas por kompensi sian stulton,
Sen bezoni de homaro la konsulton.
Do ne timu, kolektivo, pri la sorto!
Nura ŝlimo vi jen estas en retorto,
Kiun la spirito,en agad' konstanta,
Bakas ĝis atingo al stat' diamanta.
El retorto liberigos vin pureco
Kaj Justeco de la tuta homa speco.
Sed necesas, ke mem ĉiu, kiel Dio,
Sin konfesu antaù "propra" la konscio;
Ke per apartuloj en agado spita
Kolektivo venu mem al stat' spirita;
Ke mem ĉiu "propran krucon" en si portu,
Ke konvena frukto fine ne abortu.
Nur trejnanto la trejnadon mem profitas,
Kaj nur la manĝanto al malsato spitas.
Por spirit' kaj korpo estas iluzia
Pero aliula kaj nur fantazia.
Ĉiu sin mem savu: estas jen la leĝo!
Per spertado propra: kuracil' kaj preĝo.

...............................................

Krome provu "harmonie" kunvivadi,
Ĝis la Vero finsukcesos vin persvadi,
M E M.

o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o

En Pantin la 9an/6/1972.

B.G.D